*Scienca Revuo Vol.44 (1993)(2)-163*

# PROBLEMOJ de la SOCIOLOGIA INTERPRETADO de la ENTERIGA RITO en ANTIKVAJ SOCIOJ.

Vladimir I. Ionesov

La antikvaj entombigoj kiel objekto de historia scio havas ekskluzivan intereson por la arkeologo. Ilia historia graveco estas determinita per konservado en ili de la kompleksa arkeologia aĵaro, potenciale havanta konkretan ritan sencon k pro tio kapabla respeguli (en tiu au alia grado) diversajn flankojn de la materia k spirita kulturo de antikva socio. Esplorante tombojn la arkeologo laboras kun materiaj restaĵoj de pasinteco, reprezentitaj per tri bazaj komponentoj : enteriga konstruaĵo, restaĵoj de mortinto, enteriga aĵaro. Kutime, ili ĉiuj estas donataj al la esploristo kun iugrada deflankiĝo de sia origina strukturo (detruiteco, prirabeco, foraerumeco k simile). Rekonstruado de la strukturo de la tombo (tipo de la tomba konstruaĵo, pozo k pozicio de skeleto, orientiĝo, loko de tomba aĵaro ktp) estas la unua plej grava premiso por la tuta plua arkeologia analizo.

Dun lastaj jaroj oni intensive serĉas diversajn statistikajn k sociologiajn metodojn de esplorado de la antikvaj tomboj, ebligantajn maksimume plene k motive ampleksi la tutecon de arkeologiaj signoj k konstrui sur ilia bazo la logikan modelon de enteriga rito (Masson 1976; Leonova, Smirnov, 1977; Kameneckij, 1986; Bunjatjan, 1985; Alokŝin, 1986; Binford 1971; Renfrew, 1984; Häusler, 1976).

Se empiria nivelo de konado baziĝas plejparte sur la logika–matematika aparato de esplorado, interpretada (teoria) nivelo estas bazita sur la uzado de principoj de historia–sociologia modeligo. Tamen, ties dialektika uzado estas ankorau malmulte disvastigita en arkeologio. Tio koncernas ankau tiun eskluzive informecan fonton de sociologia rekonstruado kiel enteriga rito, ties filozofia esenco k reglamentiga funkcio en suprerstruktura sistemo de antikva socio.





*Scienca Revuo Vol.44 (1993)(2)-163*

Rekonstrui riton de entombigo ankorau ne signifas "montri ĝian historia–sociologian enhavon. Leĝon ne eblas malkovri eĉ helpe de la plej skrupula listo de 'signoj', 'trajtoj' de la konkreta fenomeno, ĉar simila priskribo neeviteble miksas gravan k malgravan, hazardan k necesan" (Barg, 1984, p. 85). Tio ne eblas sen klarigo de specifeco de enteriga rito. Neceso de tiu ĉi aliro estas kauzita de la plej grava baza metodologia postulo: antau ol komenci historian esploradon de objekto necesas antaue scii, kio ĝi estas, kia estas la esenco de la objekto.

La enteriga rito kiel fonto de sociologia rekonstruo estas antau ĉio rezulto de celdirekta agado de la homoj. Antau ol efektivigi la riton de entombigo, la homo celdirekte faras ĝin en sia kapo k nur poste realigas ĝin en la tombigo. Jen pro kio estas ege interese observi la itineron de movado de celo de la individuo de la objektiva realo tra la homa kapo al la enteriga praktiko. Nur post tio, kiam la homo mense ekkonscios k pritaksos ĉirkauantan estadon, li venas al tiu au alia cela starpunkto. Sed la celo, kiel sciate, ne ŝlosas sin en unuflanka supreniĝo de la objektiva al la subjektiva, kontraue, ĝi estas deira punkto por la posta movado, sed jam de la subjektiva al la objektiva. Temas pri tio tra kiuj etapoj k ŝtupoj trapasas la celo (ĉi–kaze temas pri la intenca sendado de mortinto en la "transan mondon") al sia fina punkto (tombo).

Ĉi–rilate elvokas intereson la triŝtupa eliĝo proponita de N.B.Leonova k Ju.A. Smirnov, ligita kun la morto de la homo en strukturo de supersistemo de difinita kulturo (Leonova, Smirnov, 1977). La unuan eliĝon ili ligas kun la momento de fizika morto de individuo (fizika eliĝo), la duan – kun la ŝanĝo de rilato al la mortinto flanke de vivantaj homoj (spirita eliĝo), la trian – kun la fakto de la enterigo mem (Leonova, Smirnov, 1977, p.17–18). La fizika eliĝo (FE) estas forigo de la individuo el la socio. Sed ĉar la socio estas produkto de reciproka interagado de la homoj k estas interplektita per materialaj–produktadaj interrilatoj, la mortinta individuo respektive foriĝas el la sistemo de socia produktado. Do, tiu ĉi eliĝo okazas je la nivelo de produktadaj sociaj rilatoj. La spirita eliĝo (SE) estas konsciado de la morto de la homo. Ĝi antauvidas la psikajn travivaĵojn, timon, imagojn de la homo pri la transigo de mortinto en la "transan mondon". Tiu ĉi eliĝo

okazas je la nivelo de ideologiaj rilatoj de la homoj. Materiala–rita eliĝo (ME) kvazau koncentras la unuajn du eliĝojn k estas kiel "oficiala" k fina "registrado" de foriĝo de la individuo el la socio. Je la nivelo de tiu ĉi eliĝo okazas material–rita transformiĝo de la konsciita estado (bildo 1).




BILDO 1. LA SKEMO DE STRUKTURAJ ELIĜOJ EN LA SOCIALA SISTEMO DE LA SOCIO, KAŬZITA DE MORTO DE HOMO

Tiamaniere, la morto de la pastro estas ĉeso de lia fizika vivo, k sekve tio signifas lian eliĝon el la produktada, sociala sfero de la socio. Tiu ĉi morto estas taksata de la samtribanoj de la pastro antau ĉio el lia rolo k signifo por la socio, t. e. de lia dumviva sociala kontribuo en la komunumon. Nur tiu ĉi kontribuo finfine difinos la gradon de elspezota laboro por lia entombigo, en kiu kutime realiĝas la principo de la ekonomiaj k socialaj ebloj en la surtera vivo al la adekvataj bezonoj en la "transa vivo". Samtempe oni ne povas ne konsideri, ke dum la komenco la sociala diferenciĝo oni ne nepre postsekvigis la posedaĵ–havan diferencon (Ĥazanov, 1979, p. 158). Krom tio en iuj primitivaj socioj "veraj tribestroj ĉiam mortis kiel malriĉuloj" (Averkieva, 1960, p. 128). Tamen, laugrade de pliprofundigo de sociala stratifikado la faktoro de sociala determinismo ĉiam pli forte subordigis al si la enterigan riton je ĉiuj supremenciitaj niveloj.

La interilato de la konscio k estado grandparte difinas la dependencon de



la SE de la (materiala–produktada) FE. Kaj tio signifas, ke preskau ĉiam la konkreta FE kondukas al la konkreta SE. Tiel dum dominado de seks–aĝa tendenco en evoluo de la socio, la morto de viro, virino, infano, kutime ebligas nur tian SE konformantan al la rolo k loko, kiun ili okupas en la sistemo de produktadaj socialaj rilatoj.

Ekz. por la entombigo de bonhava tribestro, kutime estas bezonata pli granda kvanto da oferdonoj ol por la entombigo de ordinara komunumano. Tio, kion posedis k kio estis dumvive la mortintoj "estis transportata" de iliaj samtribanoj per la rito en la "transan mondon", kiel daurigo de la surtera mondo. Ne enkluzivigitaj en la sistemon de produktadaj rilatoj la malplenkreskaj infanoj ordinare elfalas ankau el la ĝenerale akceptita enteriga rito. Precipe tio koncernas la evoluintan primitivan socion. Kun la ekesto de fruklasaj rilatoj la statuso de bonhava individuo ege grandiĝas per altigo de lia ekonomia rolo en la sistemo de produktado k administrado. Laugrade tiu ĉi statuso fariĝas heredeca. Kaj tial jam ĉiuj membroj de lia familio, inkluzive la infanaĝaj, ekhavas fiksitajn privilegiajn socialajn rajtojn. La arkeologian ilustraĵon de simila situacio demonstras tombaj kompleksoj de kulturo SAPALLI de Bronza Epoko (suda Uzbekistano). Se dum fruaj etapoj de kulturo la entombigoj de infanoj estis farataj sen stabila observado de ritaj reguloj, kun evoluo de la fruklasaj rilatoj, ĉiam pli ofte oni enterigis infanojn same kiel plenaĝulojn. En la tomboj oni lasis diversspecan enterigan aĵaron, oni faris oferdonojn de animaloj k ritan bruligon de la fajro (Ionesov, 1990). Kompreneble, ekzisto de la religiaj, etnaj, kulturaj k aliaj faktoroj neeviteble deformas la realan enhavon de la unua (FE) k de la dua (SE) eliĝoj je la nivelo de ilia materiala–rita reflekto.

Komplekso de esplorado de la enteriga rito konsistas ĝuste en tio, ke ĝi ne havas sian realan objekton de reflekto. Ĝi reflektas jam duafojajn, foje elpensitajn, malraciajn ideojn de la homoj. Materiala bazo mem rekte ne formas enterigajn kutimojn, ritojn k kultojn. Ili evoluas sur la propra "pensmaterialo", t. e. surterene de la religiaj–mistikaj vidpunktoj de la socio (Kapustin, 1984, p. 204).


Lau nia opinio eblas distingi du esencajn flankojn de la rito – reala k iluzia (mistika). La <u>reala</u> flanko reflektas socialaj–ekonomiajn eblojn de la

socio, ties ekonomian, socialan, kulturan potencialon, t. e. la gradon de konata, 'konkerita' ĉe la naturo. Male la <u>iluzia</u> flanko montras la gradon de sociala–ekonomia limigiteco, dependeco, la sferon de "nekompreneblo", kion oni ne povas fari sen helpo de la rito. La rito rolis kiel instrumento por transdono de vivnecesaj bezonoj, "postuloj" de la komunumo en la "transan mondon". Ĉi tie la rito rolas kiel peranto inter la ebla k neebla, reala k iluzia, racia k malracia. Ĉi tiuj flankoj de unu tuteco estas dialektike interligitaj k nedisigeblaj. Samtempe, ĉiu el la flankoj de la rito respondecas pri sia kampo de influo k havas konkretajn socialajn determinantojn. Tiel, elspezoj de laboro por entombigo, enteriga instrumentaro, oferdonoj, funebra rememora manĝo ks. eniras la sferon de materialaj ebloj de la socio. Ju pli altaj estas la ekonomiaj ebloj de la individuo, familio, gento, des pli altaj iliaj bezonoj, des pli multe da "postuloj" ili sendas en la "transan mondon" pere de ritaj aktoj, des pli enhavriĉa, informplena estas la enteriga rito ( komparu la tombon de pastro k de ordinara komunumano). Sed pro tio, ke konkreta "postulo" havas sian konkretan "ekscitilon", do ekkoninta ĝian enhavon, deĉifrinte ĝian "kodon", ni povas vidi ĝiajn socialajn surterajn radikojn. La konkreta postulo kvazaŭ provokas konkretan ritan akton. Se ni scias la sferon de socialaj postuloj, materialigite reprezentitaj en la enteriga rito, el tiu ĉi postuloj prave eblas veni al la objektiva historia realo, naskinta ilin. Ni pensas, ke ĝuste kunpletiĝo de la kontraŭdiroj en la streĉan nodon en la sfero de la socialaj–posedaj rilatoj, estas unu el la kaŭzoj devigantaj la homojn turni sin al la rito, per kiu neeviteble pleniĝas la krevaĵoj, truoj k malplenoj formiĝantaj en la vivo de la socio. Ni ankaŭ opinias, ke el tiu ĉi vidpunkto tute prave videblas en la rito ankaŭ la originala maniero de solvado de socialaj konfliktoj.

Tiammaniere, la enterigan riton eblas pritrakti kiel siaspecan ĝeneraligan formon (reflekton) de vivagado de la homoj, en kiu trans iliaj ritaj aktoj esprimiĝis la sentoj k vidpunktoj de diversaj grupoj de la socio. "La religia ekstazo estas karakterizata ĝuste per ĉesigo aŭ bremsado de la tempo, kunpremado de la pasintaj k estontaj tempoj en unu nedisigeblan punkton" (Losev, 1991, p. 85). En la plej ĝenerala aspekto la enteriga rito estas tuteco de aktoj, sentoj k ideoj de la homoj, kaŭzitaj pro morto de la homo k ligitaj



kun farado de la certaj ritaj devoj rilate al la mortinto. El tio ĉi sekvas, ke la bazo de la enteriga rito de la antikva socio estas tri determinantaj komponentoj – la ritaj aktoj (ceremonioj), sistemo de vidpunktoj pri la "transa mondo" ( ideoj, principoj, mitoj, legendoj ktp) k emocia ekzalteco (travivaĵoj, impulso, timo, priploro, memturmentado k aliaj stresaj statoj) (bildo 2).





<u>BILDO 2.</u> LA STRUKTURO DE LA ENTERIGA RITO

Necesas emfazi, ke ĉiuj tiuj komponentoj interpenetreblas k havas inter si plej fortikajn ligojn k dependecon. Kiel mi menciis ĉi–supre, materiiĝon spertas nur unu el la komponentoj de la enteriga rito. Ni nomu ĝin ritaj aktoj (RA). Sed ĉar la rita praktiko mem estas determinata de la ideologiaj konsideroj k emocioj de la homoj, ĝi ne povas ne reflekti ilin. Krom tio, la RA en la enteriga rito tute ne ĉiam ricevas sian materian legitimon, ĉar la funebra ciklo okupas sufiĉe longan tempo–spacon ( de la momento de morto de la homo ĝis la funebra rememora manĝo), kio ankaŭ formas ĝian heterogenecon k neidentecon.

Se ni imagos la ritan praktikon de la homoj kiel ceremonion plilongigitan en la tempo, ĝi povas aspekti proksimume jene:


– la ritaj aktoj en la momento de la morto de la homo (RA 1),
– ritaj aktoj dum enterigo ( ĝis la momento de entombigo) (RA 2),
– la ritaj aktoj dum entombigo (RA 3),
– la rito de tombo mem(RA 4),
– la ritaj aktoj post entombigo (RA 5); (bildo 3).




BILDO 3. LA STRUKTURO DE LA ENTERIGA CIKLO.

Bedaurinde, la arkeologo havas eblon sufiĉe plene utiligi la artefaktojn nur de RA 4 (tombo mem) k parte de RA 3 k RA 5 (ŝpuroj de funebra rememora manĝo k surtomba oferdono). Kvankam la tombo mem estas la ĉefa kerno de la tuta enteriga rito, ĝi ne estas ĝia fina punkto, ĉar la ritaj aktoj dauras ankau post entombigo de la mortinto.

Se imagi la procedon de la enteriga rito kiel siaspecan movadon de la celo de la homo au de homaj grupoj al sia fino, oni povas ricevi la ĝeneralan linion de movado de la enteriga rito (bildo 4).




BILDO 4. EVOLUO DE LA ENTERIGA RITO EN LA SOCIALA SISTEMO DE LA SOCIO

Oni devas agnoski, ke tiu ĉi linio estas reprezentita en la plej simpligita varianto por distingi la ĉefan kernon en evoluo de la enteriga rito. Sur tiu ĉi trunko neeviteblas multnombraj branĉoj. Tiel ekz. estas tre interese k utile observi la reflektojn de influo de la enteriga rito je la sociala konscio de la homoj post RA 5. Realiĝanta fakto de la entombigo de la homo k rememora manĝo estas ne nur logika fino de la enteriga rito, sed ankau kvalita komenco por la nova movado. Ĉi tie ekfunkcias la situacio rimarkita de filozofoj, dum kiu subsistemoj konstruitaj super la ekonomia bazo komencas ludi gravan rolon en formigo de la returnaj ligoj. "Kaj ju pli altas tiu subsistemo super la sistema fundamento, des pli grandan rolon ludas tiuj ligoj en formigo de ĝia



strukturo. La baza strukturo determinos la formon de reflekto de tiu enhavo. Relativa sendependeco de tiu ĉi formo klarigas ĝian tendencon al "malmoligo", malrapidigo de ĝia evoluo" (Barg, 1984, p. 113–114). La celo realigita en la tombo (sendi mortinton en la "transan mondon") fariĝas premiso por lia returna movado de la entombigo al la reala vivo. Formiĝas tn. "sistemo vivantoj – mortintoj", bazita sur la senco de la sociala ligo inter generacioj (Tokarev, 1985). Interne de tiu sistemo naskiĝas tiuj historiaj fenomenoj kiel la kulto de prapatroj (mortintoj), la zorgo pri ili, timo antau transaj fortoj. "Post la entombigo la ligo inter mortinto k ties samgentanoj ne ĉesis, kontraue, ĝi estis tre zorgeme daurigata. Vidante en la animoj de la prapatroj siajn defendantojn k protektantojn la komunumo en la sama tempo estis konvinkita, ke ilia efikeco dependas de tio, kian atenton ili ricevas de la komunumo. Inter la komunumo k prapatroj konserviĝis maksimume fortikaj rilatoj de siaspeca interŝanĝo: al unu flanko direktiĝis oferdonoj k dankemaj glorigoj, al la alia la helpo en la malfacila, kriza minuto" (Jordanskij, 1982, p. 180). Ĉio ĉi ne lastvice influis la evoluon de la enteriga praktiko de la primitiva socio k de ĝi enpenetris la strukturon ne nur la religia konscio, sed ankau de la sociala estado.

Literaturo.

1. Alokŝin V.A.: Socialjnaja Struktura i Pogrebaljnyj Obrjad Drevnezemledeljĉeskiĥ Obŝĉestv – Leningrad, 1986, 192p.
2. Averkieva Ju.P.: Razloĵenie rodovoj Obŝĉiny i Formirovanie Ranneklassovyĥ Otnoŝenij v Obŝĉestve Indejcev Severo–Zapadnogo Pobereĵja Severnoj Ameriki / Trudy Instituta Etnografii, Novaja Serija, T.70 – Moskva, 1960, 277 p.
3. Barg M.A.: Kategorii i Metody Istoriĉeskoj Nauki – Moskva, 1984, 342p.
4. Binford L.R.: Mortuary Practices, their Study and their Potential – Mem. Soc Amer. Archaeol., 1971, Vol. 25, p. 6–29.

5. Bunjatian E.P.: Metodika Socialjnyĥ Rekonstrukcij v Arĥeologii – Kiev, 1985, 228 p.
6. Häusler A.: Zur Problematik der Gräbersoziologie / Moderne Probleme der Archäologie – Berlin, 1976, p. 83–102.
7. Ĥazanov A.M.: Klassobrazovanije: Faktory i Meĥanizmy / Issledovanija po Obŝĉej Etnografii – Moskva, 1979, p. 125–177.
8. Ionesov V.I.: Stanovlenie i Razvitie Ranneklassovyĥ Otnoŝenij v edlozemledeljĉeskom Obŝĉestve Severnoj Baktrii – Autoreferat Dis. Kand. Ist. Nauk, Samarkand, 1990, 25 p.
9. Iordanskij V.B.: Ĥaos i Garmonija – Moskva, 1982, 344 p.
10. Kameneckij I.S.: Kod dla Opisanija Pogrebaljnogo Obrjada / Arĥeologiĉeskie Otkrytija na Novostrojkaĥ, Vyp.1 – Moskva, 1986, p. 136–194.
11. Kapustin N.S.: Osobenosti Evolucii Religii – Moskva, 1984, 222 p.
12. Leonova N.B., Smirnov Ju.A.: Pogrebenija kak Objekt Formaljnogo Analiza, Vyp. 148 – Moskva, 1977, p. 16–23.
13. Losev A.F.: Filosofia, Mitologia, Kultura – Moskva, 1991, 526 p.
14. Masson V.M.: Ekonomika i Socialjnyj Stroj Drevniĥ Obŝĉestv. – Leningrad, 1976, 192 p.
15. Renfrew C.: Approaches to Social Archaeology – Edinburgh, 1984.
16. Tokarev S.A.: Pogrebaljnye Obyĉai, Iĥ Smysl i Proisĥoĵdenie – "Priroda", N 9, 1985, p 82–87.

Adreso de la autoro:
Vladimir I. Ionesov, C. Sc.,
Supera Scienca Kunlaboranto de la Instituto de Arkeologio de Akademio de Sciencoj de Uzbekistano
ul. Akad. Abdullaeva 3
703051 SAMARKAND
UZBEKISTANO.



# Pri resinkronigo en kodoj

Reinhard Fössmeier
AIS San-Marino, sekcio 1
Dollmannstr. 19, DE-81541 München
<refo@ixos.de>

## 1 Enkonduko

Kiam en iu mesaĝo, konsistanta el vico da unuopaj signoj, perdiĝas parto, ekestas la problemo, kie post la breĉo oni povas rekomenci la legadon de la mesaĝo, por ricevi almenaŭ parton de la enhavo. Se la mesaĝeroj estas literoj, oni povas ekzemple rekomenci ĉe la unua interspaco post la breĉo, sciante ke tie komenciĝas nova vorto. Se la mesaĝeroj estas unuopaj bitoj, la situacio estas malpli favora: Ne sciante, kiom da bitoj perdiĝis, oni devas eksperimenti por eble ricevi sencohavan tekston. Se ekzemple la uzata kodo uzas unu bitokon por ĉiu signo, ekzistas ok malsamaj ebloj por resinkronigi la legadon post la breĉo en la vico. Se la mesaĝo estas sufiĉe redundanca, tamen nur unu el la ok eblaj legaĵoj estas sencohava mesaĝo. Bildo 1 montras la komencon de la ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj (*NI, LA POPOLOJ...*), kodita laŭ la (kvinbita) teleksa kodo, kaj la kvin eblajn legaĵojn de tiu mesaĝo, laŭ la kvin eklego-punktoj.

Breĉo en mesaĝo povas okazi pro perturbo en la transsenda kanalo, aŭ pro difekto de storilo, ekzemple bendo aŭ disko. En ambaŭ okazoj ofte estas sciate, kiom da informo perdiĝis, tiel ke la resinkronigo ne estas problemo, se la uzata kodo havas fiksan vorto-longon. En la ekzemplo de bitoka kodo do ne necesas eksperimentado, se almenaŭ estas sciate ke perdiĝis entjera nombro da bitokoj.

Alia afero estas kodoj kun varia vortolongo. Ĝuste por la longtempa storado de datenoj oni ofte uzas tiajn kodojn por malpliigi la bezonon de storo. Ekzemplo estas NKI-arkivoj (NKI = ne-kodita informo), kie dokumentoj estas storataj en faksimila formo, do kiel bildo el nigraj kaj blankaj punktoj, sen kon-